Hermann Löns,

La sekreto

tradukita de Manfred Retzlaff

Kiam sole iris tra
Verda erikejo mi,
Juna venis jen ĉasist',
Verdan veston portis li.
Ja verdas eriko
Nun ĉie ĉi,
Sed ruĝas la rozo,
Dum floras ĝi.

Sur la mola verda musk',
Sub la branĉoj de abi'
Sidis mi sur lia sin',
Kaj min kisis tie li.
Ja verdas eriko
Nun ĉie ĉi,
Sed ruĝas la rozo,
Dum floras ĝi.

Kiam hejmen venis mi,
Min demandis la patrin':
"Kie estis vi, infan'?"
Sed mi ne malkaŝis ĝin.
Ja verdas eriko
Nun ĉie ĉi,
Sed ruĝas la rozo,
Dum floras ĝi.

Devas scii tute ne
La patrino tion ĉi,
Scias tion krome de
La erika ej' nur mi.
Ja verdas eriko
Nun ĉie ĉi,
Sed ruĝas la rozo,
Dum floras ĝi.

. . .

Traduko de la Germana poemo "Das Geheimnis" de Hermann Löns *(∗1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1989-04-28.*

MR-219-2 / Arg-661-1326 (2012-11-18 13:12:24)

Pri la Hermann Löns vidu la retejojn http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_L%C3%B6ns *kaj* http://www.loens-verband.de/. *Vidu ankaŭ:* http://www.zeno.org/Literatur/M/L%C%B6ns,+Hermann/Gedichte/Der+kleine+Rosengarten/Das+Geheimnis.